


SVISA ESPERO

OFICIALA ORGANO DE
SVISA ESPERANTO-SOCIETO
(S. E. S.)



Klarigo: ★ Esperantistaj centroj en Svislando
Unuopaj Esperantistoj ankaŭ en aliaj lokoj

Jaro 1947 — 43-a Jarkolekto

N-ro 1

Januaro

ELDONAS:

CENTRA KOMITATO DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO

Bern

la pitoreksa, mezepoka urbo en la koro de nia lando, en la centro de famegaj ekskursregionoj.

La urbo de la 32-a Universala Kongreso 26-a de julio — 2-a de aŭgusto 1947

Ĉiu Sviso rigardu kiel sian honoran devon, la tujan aliĝon...

Ĉiuj en Bern, la internacie famkonata esperantista centro.

LA LIBRO

amuzajo
klerigilo
konsolanto

Ĉu vi scias... ke la esperanta biblioteko estas tre riĉa? ... ke ĝi ampleksas pli ol 10 000 volumojn?

LEGANTE grandiĝas viaj lingvo-spertoj
LEGANTE esporti la riĉan literaturon de aliaj landoj

Libroj de nia majstro, tradukoj de klasikaj verkoj, perloj el naciaj literaturoj, originalaj verkaĵoj, poemoj, romanoj, noveloj, facilaj rakontoj, faklibroj ktp.

Ĉiu akirebla libro estas por vi prizorgata. — Atentu la recenzojn de novaj libroj en tiu gazeto. — Postulu libro-listojn de diversaj eldonejoj.

Libro-agentejo:

Otto Walder

Eigenheim, Romanshorn
P.-C.-Konto VIII 12139

SVISA ESPERO

Oficiala informilo de Svisa Esperanto - Societo (S.E.S.)
Societa kaj redakcia adreso: Neuveville (Berne) Poŝtĉeko: VIII 21395 Zch.)

=====
1947/n-ro 1 Januaro. Jara abono (8 n-roj) en Svislando fr. 2.50, en eks-
terlando fr. 3.-- aŭ 10 internaciaj respondkuponoj.

=====
Jara kotizo de Svisa Esperanto-Societo (inkl. abonon): fr. 4.--

=====

SES-Kongreso 1947

Okaze de sia lasta kunveno, la CK de SES fiksas la daton por la
jara kongreso

je la 15-16-a de Marto 1947, en L U Z E R N .

Sabaton posttagmeze okazos eventuale ekzamenoj. La personoj, kiuj
intencas akiri la "Ateston pri Lernado" aŭ la "Superan Diplomon" petu
informojn kaj enskribigu sin kiel eble plej frue de la prezidanto de la
Ekzamena Komitato, d-ro M. Jaccard, Vogelsangstrasse 11, Zürich.

Por la vespero, estas antaŭvidata amika kunestado. Diversaj dis-
traĵoj kiel muziko, kantaado, deklamoj, surprizoj, ktp. agrabligos ti-
un vesperon en amika rondo. La personoj, kiuj kunhelpas en tio bonvolu
informi s-ron J. Koch, Pilatusstrasse 55, Luzern.

Dimanĉon matene okazos, kiel kutime, la ĝenerala jara SES-kunveno.
Komuna tagmanĝo kunigos la kongresanojn kaj poste, laŭ la vetero, ni
vizitos la urbon, promenos aŭ amike kunestados en agrabla loko.

La detala programo kun la necesaj informoj detalaj aperos en SE/2,
kiu eliros fine de Februaro.

◀▶ La malmultekostaj finsemajnaj biletoj certe ebligas al
multaj la partoprenon en tiu kongreso,

JAM REZERVU TIUN DATON KAJ PRETIGU VIN VENI MULTNOMBRAJ EN LUZERN !!

=====

A L V O K O .
=====

Pli kaj pli ni sentas la plej urĝan necesecon akiri novajn
fortojn por nia landa E.-societo por ĝia renoviĝo. Pro tio ni
insiste petas la grupojn kaj izolulojn instigi junulojn al
lernado de nia lingvo. Ili estu pretaj instrui kaj prezenti i-
lin por ekzameno okaze de la SES-kongreso en Luzern. Restas al
vi sufiĉe da tempo por tiel instrui ilin ke ili povu akiri la
Ateston pri Lernado. Bona nombro el niaj membroj devus serio-
ze eklabori kaj prezenti sin por akiri la Superan Diplomon.
Ĉiuj grupoj devus havi almenaŭ unu personon, kiu kapablu in-
strui. Per ĉiujara kurso la grupoj povus tiele renovigi la gru-
pan vivon per freŝaj fortoj.

 Registrarano Enrico Celio
 =====

Honora Prezidanto de la 32-a Universala Kongreso de Esperanto.
 =====

La Svisa Registaro rajtigas sian Vic-prezidanton s-ro Enrico Celio, ministro de la Federacia Poŝt- kaj Fervoj-departemento estiĝi la Honora Prezidanto de la 32-a Universala Kongreso de Esperanto 1947 en Bern .-

Per tio la Svisa Registaro montris al la Esperanta movado grandan honoron. Ĉar per tio ĝi esprimas sian ĝojon, ke la venonta Universala Kongreso okazos en Svislando kaj per tio ĝi ankaŭ aprobas la laŭdindan celon de la Esperanto-movado kaj esprimas samtempe sian simpatian por la ideo de la mondlingvo.

La Registaro transdonis sian plej koran deziron por la efektiviĝo de la Kongreso. Dum la Solena Malfermo de la Kongreso la 27-an de Julio, verŝajne la federala konsilanto s-ro Celio salutis la Kongreson en la nomo de la Svisa Registaro.

Senpaga vizo al Svislando.
 =====

Ĉiu kongresano ricevos de la Svisaj Ambasadorejoj aŭ Konsulejoj en eksterlando senpagan vizon al Svislando montrante la kongresan karton (nur por la kongresa kaj postkongresa tempo.)

Mendu baldaŭ vian restejon en Bern.
 =====

La LKK informas la partoprenontojn al la 32-a Universala Kongreso de Esperanto, ke la restad-demando estas ege malfacila. Pro tio la LKK petas ke ĉiu kongresano tuj sendu sian mendon aŭ por hotelĉambro aŭ por ĉambro ĉe privatulo.

Pro la relative malgranda nombro de hotel- kaj privatĉambroj, kiuj estos je dispono, la LKK estas devigata pritrakti la mendojn laŭ la sinsekvo de ilia alveno al Bern kaj poste ne estos eble plenumi eventualan specialan deziron. La unuaj mendantoj ricevos la plej bonan servon.

Ankaŭ la mendanto de Amas-restejo devos baldaŭ sendi al LKK sian mendilon. Kiu ne havas aliĝilon aŭ mendilon por restado tiu postulu ĝin de la Loka Kongresa Komitato, Bundesgasse 20, Bern, Svislando.

Transpago al Svislando.
 =====

La partoprenontoj al la 32-a Universala Kongreso de Esperanto 1947 en Bern loĝantaj en lando kun deviz-malfacilaĵoj devas turni sin tuj al la Landa Asocio, kiu faros la necesajn paŝojn por solvi tiun aferon.

A l i ĝ o j
 =====

Ĝis 11/I/47, aliĝis kaj pagis la kongreskotizon 538 personoj el 25 landoj, pliaj ĉ. 170 personoj nun klopodas por ricevi la permeson pagi la neceson al la LKK. kaj tiele havi la eblecon ankaŭ aliĝi.

Jarraporto de la prezidanto de SES pri la jaro 1946.

1. Laboro de la CK. La laboroj de la Centra Komitato efektiviĝis en harmonio dank' al sindonemo kaj laboremo de ĝiaj membroj. La aferoj estis pritraktataj dum sep kunvenoj kaj pere de ses cirkuleroj. Dum ĉi tiu jaro la korespondado restis daŭre ampleksa pro la iom-post-ioma pliboniĝo de la internaciaj rilatoj.

2. "Svisa Espero". Nia modesta bulteno povis sufiĉe regule aperi malgraŭ aliaj tempoprenaj laboroj. Ĉar ne alvenis kritikoj, ni konjektas ke ĝi ĝenerale kontentigis niajn membrojn. Ni ŝuldas apartan dankon al d-ro Jaccard, kiu kontrolis la manuskriptojn, kaj al s-ro Schneider, kiu sindoneme kaj bele presis nian organon.

3. Eldonaĵoj. Dum la jaro ne eliris novaj eldonaĵoj. Tamen ni devis zorgi pri la disvastigo de "Pensoj de Zamenhof". Pri tio ni devas konfesi, ke ni ne renkontis sufiĉan apogon de niaj membroj. Se kelkaj vere faris sian eblon - pri kio ni dankas ilin -, la granda plimulto ne konsciis pri ĝia elementa devo.

Tiom longe kiam la CK ne povos kalkuli pri vigleco kaj sindonemo de la membroj kaj grupoj, ĝiaj klopodoj kaj laboroj ne havos grandan efikon.

4. Esperanto-Presservo. Tiu fako ne tute kontentige funkciis de post la retiriĝo de la gvidanto pro personaj malhelpoj. Tamen de tempo al tempo gazetartikoloj aperis. Dank' al fervora samideano ni estis informataj pri maltaŭga artikolo en konata velŝa gazeto, kiu donis al la legantoj tute malĝustan impreson pri Esperanto. Tiu informiĝo donis al ni la okazon protesti ĉe la redakcio de la gazeto, kiu poste donis ĝustigon pri la malveraĵoj. Tiu eksperimento devus instigi ĉiujn niajn membrojn sendi al la CK la eltranĉaĵojn (bonajn kaj malbonajn), por ke la CK estu informata kaj povu, se necesas, interveni ĉe la koncernaj redakcioj.

5. SES-Kongreso kaj verda ferio. Dum la semajno antaŭ la SES-kongreso okazis la "Verda Ferio", kiu plene sukcesis. Por tiu okazo ni venigis el Nederlando s-ron Ĉseh, kiu gvidis perfektigan kurson laŭ lia majstra maniero. Vespere li prelegis pri diversaj interesaj temoj. Estis nur domage, ke ne pli multaj gesamideanoj profitis tiun unikan okazon...

Sabate vespere d-ro Privat prelegis pri "La horo de Hindujo" kun elokventeco, kiu ĉarmis la aŭskultantaron.

La kongreson mem partoprenis 55 personoj. La tuta aranĝo estis perfekta dank' al la klopodoj de la loka grupo kaj ties prezidanto.

6. Ekzamenoj. Sep kandidatoj prezentigis por la ekzamenoj. Tri por la "Atesto pri Lernado" kaj kvar por la "Supera Diplomo". Ĉiuj sukcesis, nome: por la Atesto: f-ino Stücheli, Fribourg; s-ro Hiltbold, Corseaux; s-ro Liechti, Rheineck; por la Supera Diplomo: s-ro Hohl, Waldhaus-Flims; s-ro Koch, Luzern; s-ro Kuder, Hausen a. Albis; s-ro Nüesch, Balgach.

7. Interrilatoj kun la grupoj. La interrilatoj kun la diversaj grupoj estis bonaj, sed ni devas konstati, ke en parto de la grupoj la vivo ne estas kontentiga. La kunvenoj ne estas sufiĉe vizitataj. La laboremo kaj vigleco mankas tro ofte. Dum la milito oni diris por pravigi mallaboremon, ke estas necese atendi pli favorajn tempojn... nun tiuj favoraj tempoj por Esperanto venis, sed ni ne konstatas revigliĝon en la grupoj kaj ĉe multaj izoluloj. Tamen ni ne volus malpliigi la verajn sindonemajn klopodojn, kiuj estas farataj en pluraj grupoj por revigligi la entuziasmon. Ĉe la izoluloj ankaŭ

kelkaj leviĝis por redoni viglecon kie eble. Tiaflanke ni plezuris ekscii ke la Luzern'a grupo releviĝis kaj kalkulas novajn junajn membrojn dank' al la sindonemaj klopodoj de s-ano J.Koch. La juna grupo en Rheineck, fondita en 1945 bone fartas.

Ni bedaŭras, ke la grupoj ne profitis la taŭgan momenton de la Universala Kongreso por okazigi kursojn, ĉar tia okazo ne plu revenos antaŭ longe. Tiaj okazaĵoj devus esti uzataj maksimume por fari novajn adeptojn kaj se la lokaj cirkonstancoj ne permesas la okazigon de publikaj kursoj, ĉiu kapabla Esperantisto devus instrui aparte, rekte aŭ perletere, almenaŭ unu personon. Tio estas facila por tiuj, kiuj ne nur atendas ion de la societo kaj movado, sed kiuj ankaŭ volas doni ion rekompence pro la plezuroj kaj ĝojoj ricevitaj pere de la lingvo kaj movado.

Ni dankas al tiuj, kiuj faras ion laŭ la cirkonstancoj, Ni scias, ke tiaj samideanoj ekzistas en niaj vicoj, sed la CK kiu oferas laboron kaj tempon por la afero rajtas atendi pli de la memboj ĝenerale.

8. La membraro. Nia membraro iom pligrandiĝis, sed ne sufiĉe por fanfaroni. Ankaŭ la abonantaro al "Svisa Espero" kreskis. Ni esperas, ke la nunaj favoraj cirkonstancoj kaj la okazigo de la 32-a Universala Kongreso en Bern, instigos niajn membrojn propagandi kaj trovi novajn membrojn.

Ni devas ankaŭ mencii ke la morto forprenis al niaj vicoj dum la jaro: S-ro J.Borel, en Vaumarcus, iama eldonisto de esperantaĵoj en Germanujo; f-ino E.Klaus el Schwyz; s-ro K.Haas, el Luzern. Ni havu dankeman penson por tiuj gesamideanoj, kiuj kunlaboradis por la alproksimiĝo al nia idealo.

9. Regionaj kunvenoj. Printempe okazis RK en Zürich kaj Morges, aŭtune en Rheineck kaj Bern. Tiuj Regionaj Kunvenoj pli kaj pli fariĝas tradiciaj. Ili estis kontentige vizitataj en ambaŭ partoj de la lando. Kiel kutime, krom raporto pri la laboroj de la CK, okazis prelego pri diversaj interesaj temoj. Estis ankaŭ utila okazo praktiki la lingvon en amika kunestado.

10. UEA-IEL. Niaj rilatoj kun ambaŭ internaciaj organizaĵoj estis daŭre bonaj. Laŭ la cirkonstancoj, ni ricevis aŭ donis reciprokajn servojn.

11. Diversaĵoj. Laŭ peto de IEL, SES komencis la kolekton de subskriboj por la petskribo al UNO. Bedaŭrinde ĝis nun nia lando ne estas en tre bona loko sur la statistiko. La agado daŭras kaj ni atendas, ke tiuj kiuj ĝis nun nenion faris tiucele ekagu. Slipoj daŭre estas je dispono.

Diversaj helpagadoj efektiviĝis dum la jaro, sed bedaŭrinde ili ne povis esti proporciaj kun la bezonoj. Kun ĉagreno, pro neeblo, ni eĉ devis rezigni pri diversaj helpoj petataj el diversaj vunditaj landoj.

- a) La helpo al Vieno, komencita en 1945 trovis la finon, post multaj klopodoj kaj penoj, kiam la kestoj alvenis en Vieno la 5-an de Junio 1946. Ĉirkaŭ 85 kilogramojn da varoj por valoro de ĉ.fr.260.- ampleksis tiu sendo, kiu plezurigis kelkajn el la sennombraj helpobezonantoj.
- b) Diversaj pakaĵoj da vestaĵoj ankaŭ povis esti sendataj al la gesamideanoj en Finnlando.
- c) Ni ankaŭ povis iomete helpi per oficejaj paperaĵoj al la Jugoslava landa societo, kiu multege bezonis tian helpon.
- d) Vi memoras, ke dum la milito jam, ni kolektis malnovajn librojn en Esperanto por havi la eblecon helpi la grupojn, kiuj ĉion perdis dum la milito. Tuj post kiam la internaciaj poŝtaj rilatoj ree

funkciis, ni ricevis el diversaj partoj de Esperantujo la peton hel-
pi per libroj la restarigon de grupoj. Do niaj antaŭvidoj praviĝis.
Tiele ni povis fari sendojn de libroj al grupoj en diversaj landoj:
Francujo, Belgujo, Nederlando, Polujo, Finnlando, Aŭstrujo. Tro ra-
pide la stoko elĉerpiĝis. Se niaj membroj volas ankoraŭ nun donaci
librojn por tiaj celoj, ni plezure daŭrigos la agadon.

La pli kaj pli bona kontakto kun eksterlando estas ilustrebla per
la multnombraj korespondaĵoj, kiujn la CK devas efektiviĝi. Dum tiu
lasta periodo (de post la SES-kongreso en St. Gallen ĝis la fino de
la jaro), la prezidanto ricevis 302 presaĵojn kaj 298 leterojn kaj
kartojn; li forsendis 151 presaĵojn kaj 264 leterojn kaj kartojn.
Siaflanke la sekretario ricevis 148 poŝtaĵojn kaj forsendis 203 le-
terojn kaj kartojn kaj 43 presaĵojn.- Krom tio la ceteraj komitat-
anoj ankaŭ havis konsiderindan korespondadon por plenumi.

Konkludo.

Tiu raporto, devige limigata, entenas nur ekrigardon al la ĉefaj
aferoj, kiujn devis pritrakti la CK.- La modestaj rimedoj de nia
kaso malebligis al la CK plenumi ĉion, kion ĝi volis. Por tio estus
necesa konsiderinda kresko de nia membraro. La faktoj montras al ni,
ke la Esperanto-movado ĝojige releviĝas kaj kreskas en la mondo, sed
ke en nia lando la progresoj estas nesufiĉaj. Flanke de kelkaj fer-
voraj kaj laboremaj gesamideanoj kaj grupoj, la plimulto, restas ap-
atia, malfidema je sukceso kaj ne sufiĉe laborema. Tamen ni esperas
ke pro la fakto, ke la 32-a Universala Kongreso de Esperanto okazos
en nia lando, tio donos al ĉiuj la necesajn fortojn kaj entuziasmon
por decideme kaj vigle repreni la kunlaboradon por la prospero kaj
plivigligo de nia verda afero en nia lando.

La devizo por la nuna jaro estu: Per ĝoja laboremo kaj entuzias-
mo al la v e n k o .

J. Gilliard.

oo

RADIO BERN 48,66m, nun disaŭdigas pri "Federalismo kaj Paco" de d-ro
Ed. P r i v a t , ĵaŭde je 18.55 h.

+++++

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO estas fondita.

Ĉar multaj ĵurnalistoj el 21 landoj sin anoncis por fakasocio ĵur-
nalista, ili fondis laŭ propono de kelkaj, la unuan estraron en Skan-
dinavio, kie troviĝas la plej multaj aliĝintoj. La prezidanto estas
s-ro Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg, Svedlando.

Fakkongresoj estas en preparoj kaj okazos en la kadroj de la 32-a
Universala Kongreso en Bern kaj de la SAT-kongreso en Aarhus. Kiuj
partoprenos en tiuj kongresoj tiuj ĵurnalistoj estas petataj informi
la sekretarion de la nove fondita fakasocio.

Svisa Esperanto-Societo
Sekcio Lehrmittel
B e r n.

K a s r a p o r t o 1945 kaj 1946


Vendosumo por korespond-kursoj 1945 Fr. 336.30
Vendosumo por korespond-kursoj 1946 Fr. 230.70

Bilanco je la 15-a de Decembro 1946

havaĵo		Ŝuldoj
	Mono en la kaso poŝta ĉekk. 1049.45	
1086.63	en mono 37.18	
1000.--	Provizo 2000 kursoj po Fr. -.50	
	Ŝuldo al pruntedonintoj	932.--
	Donacoj (iros al SES)	351.--
	Havaĵo 15.12.1946	803.63
<hr/>		
2086.63		Fr. 2086.63
=====		=====


Bilanco pri pruntedonsumo 15.12.1946

Mono disponigita por eldono de la koresponda kurso	Fr. 2635.--
el tio estis donacoj	265.--
do pruntoj entute	<hr/> Fr. 2370.--
<u>Repagoj ĝis Sept. 1946</u>	
en kursoj	395.--
en donacoj	330.--
en mono	20.--
Nia ŝuldo la de Septembro 1946	<hr/> Fr. 1625.--
<u>Repagoj de 2 x 20% Okt.-Dec. 1946</u>	
en kursoj	147.--
en donacoj	351.--
en mono	195.--
Nia hodiaŭa ŝuldo	<hr/> Fr. 932.--
	=====



Esperanto-kursoj ĉe franca radio. Nia samideano Pierre Delaire, direktoro de Nacia Centro Esperanto-Oficejo, el Orléans (Francujo) sukcesis enkonduki esperanto-kursojn ĉe oficiala franca radio. Liaj kursoj okazos sur 431,5 m ĉiu du merkredo de 10 h.15 ĝis 10 h.35, en la programo de oficialaj instruantaj elsendoj.

Aliparte, Esperanto-Oficejo organizis nacian konkurson por la francaj komencantoj, rekompencante la tri sendantojn de la plej bela letero en Esperanto per senpaga vojaĝo al Berna kongreso. Tiun konkurson anoncis tre gravaj ĉiutagaj gazetoj. Tio alportis al Esperanto-Oficejo plurajn milojn da aliĝpetoj al la perkoresponda kurso.



La GLUMARKOJ de la UK estas haveblaj en la oficejo de la 32-a Universalia Kongreso de Esperanto, Bundesgasse 20, Bern. Prezo por dudek pecoj 30 centimoj aŭ unu respondkuponon. U z u i l i n l a r ĝ e !

Postmilita literaturo (IV)

Dum kelkaj monatoj malhelpite daŭrigi la recenzadon, mi nun petas la eldonistojn kaj legantojn senkulpigi min... Tuta aro de broŝuroj kaj libroj senpacience atendas sur mia tablo, ke mi ilin almenaŭ aludu. Jen kelkaj, pri kiuj mi volonte parolos en estontaj N-oj de S.E.: (a) La vidvino; (b) Mi serĉis oron kaj oleon, sed trovis...; (c) Vivo vokas; (d) La virino en bluo; (e) Elektitaj fabeloj; (f) La mondpaco kiel psikologia problemo; (g) Pac-planoj laŭ la karto. Nia SES-prezidanto sciigis min, ke ankaŭ sur lia tablo kuŝas novaj recenzotaj libroj. Konklude: Esperanto vivas!

Thorsen, Iversen, Lau, Neergaard kaj Olsson: "Tra densa mallumo".

Eldonejo: Laborista Esperanto-Klubo Kopenhago, 1942.

Kvankam tiu libro atingis nin nur post la milita fino, ĝi jam aperis en Danujo dum la germana okupacio. Tiu fakto vekas nian admiron al niaj danaj samideanoj, kiuj sukcesis ellabori tiel gravan kaj interesplenan libron en tiaj malfavoraj cirkonstancoj. Ili revis ne songe kaj pale, sed agante kaj reale (laŭ rekomendo de Kalocsay) kaj jen la rezulto de ilia revo "en tempo malesperige malluma": valora kolekto de Esperanto-eseoj pri movado kaj lingvo, kun multaj precizaj sciigoj kaj pripensindaj rimarkoj.

La unua parto, titolita "Kluba kavalkado", temas pri la historio de la Esp-ista laborista movado en Danujo. Ĝi mirinde kompletigas la ĝeneralan historion de la SAT-movado resumitan en la jarlibro de UEA 1939-1940. Oni ne povas legi tiujn paĝojn sen vigla interesiĝo. Instruaj estas la priskribo de la organizado de SAT-kongreso, la konstato pri la fanatika mentaleco kaj dissolviga influo de germanaj rifuĝintoj, la internaj konfliktoj. Sed amuza estas la kelklinia priskribo de kelkaj fremdaj Esp-istaj vizaĝoj trapasantaj Kopenhagon. Ekz-e pri J. Baghy: - "Li estis pelte vestita kaj iomete arogante impresis" kaj pri la "usonano" J. Scherrer: "Persone li impresis iomete tro memkonscia", ktp.

La dua parto temas pri la dumilita stato de la Esperanto-movado kaj ties perspektivoj en la estonto. Ni plezure legas, ke pluraj sciigoj pri nia movado kaj pri la sorto de la familio Zamenhof alvenis al Danujo nur pere de nia modesta organo "Svisa Espero". La ĉapitro pri la perspektivoj de la Esperanto-movado devus esti legata kaj pripensata almenaŭ de ĉiuj "konsilantoj B" de nia svisa societo. Ili trovos en ĝi multajn valorajn ideojn, eĉ se ili ne tute aprobas la kelkloke montratan Marxistan dialektikon kaj materian koncepton de la mondhistorio.

Pri la tria parto ("Esperantologio kaj ties disciplinoj"), mi ne multon diros, krom ke ĝi funde analizas la diversajn rimedojn, kiujn ni konscie aŭ nekonscie uzas por esprimi nin en Esperanto. Tiu pritraktaĵo nuance kompletigas la "klasikajn" studaĵojn de Couturat, Aymonier, De Saussure, Collinson, Drezén, Kalocsay, Stojan, Wüster, k.a.

Entute libro aĉetinda kaj studinda de grupoj kaj izoluloj, kiuj volas koni la "mekanikon" de nia lingvo. Jen kelkaj perloj el la teksto:

"Klubanoj ne devas enmarĉiĝi en kluban memsufiĉecon, la ideo mem de nia lingvo ja tute kontraŭas al tia tendenco. Ni opinias, ke plej bone ni solenas per atingo de kontakto kun pli vastaj rondoj ekster nia propra cirklo".

"En la statutoj oni severe proklamis, ke sufiĉas por eksigo, ke ano ne faras ion por lerni Esperanton".

"Per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskuto, oni celas, ke la klubanoj ne endormiĝu".

"Eĉ se pli serioza subpremo de Esp-o okazus en la proksima estonto, tamen tute certe la teknika-ekonomia-kultura evolvo finfine nepre venkigos la internacian plan-lingvon kiel naturleĝe fundamentitan konsekvencon".

"Jarlibro, 2-a parto, 1946". Eldonis Internacia Esperanto-Ligo. Ne aĉetebla, nur por membroj. Entenas aldonojn kaj ŝanĝojn post apero de la 1-a parto. De daŭra valideco estas la ankaŭ entenata "Leĝa terminaro" pri kies utileco, eĉ urĝa neceseco neniu malkonsentos. M.J.

NIA PAĜO

Frandemulo,

Petro 6-jara havas dentdolorojn. Sia patrino klarigas al li ke la multaj sukeraĵoj manĝitaj estas la kaŭzo de tiuj doloroj, kaj ke kiam li estos granda li ne plu povos manĝi pro manko de dentoj..

- Estas al mi egale, li respondis, mi ĉiam havos sufiĉe da dentoj por manĝi kremon !...

Eksperimentulo.

- Doktoro, vi forgesas, ke vi petis min eltiri la langon jam de 3 minutoj..

- Ne sinjorino, mi ne forgesis, sed mi bezonas trankvilon por skribi mian recepton !

Malmola koro.

- Ĉu vi ŝatas la infanojn?

- Ne ĉiujn...

- Kiujn do ?

- Tiujn, kiuj krias !

- Kial ?

- Ĉar oni forportas ilin....!

Inter infanoj,

-Via patro, kiu estas ŝuisto, certe estas tre avara, ke li lasas vin iri kun tiom difektitaj ŝuoj.

- Kaj la via, nu ! Li estas dentisto kaj via fratineto nur havas unu denton !

Restanta poŝto.

- Sed Sofio jam antaŭ unu semajno mi donis tiun leteron al vi por porti ĝin al la poŝto !

- Jes sinjorino, sed ĝi tiom bone odoris ke mi metis ĝin en mian ŝrankon por bonodorigi miajn tol-aĵojn.

Malfeliĉulo.

- S-ro policisto, mi petegas vin interveni ĉe mia edzino, ĉar ŝi traktas min kiel hundon kaj laborigas min kiel mulon...

- Ho, tiaokaze vi devas turni vin al la societo por la Protekto de la bestoj !..

DEZIRAS KORESPONDI:

S-ro Reinhold Lehmann, Turnerweg 3, Dresden N 6, (Germanujo) dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

E-ino Lina Sarzano, Corso Francia, 47, Torino, (Italujo) dez.kor.kaj interŝanĝi pm, ankaŭ kun itallingvanoj.

BIOLOGI-DINAMIKAJ KULTURMETODANOJ kaj aliaj kulturistoj ! Mi estas 23-jara sveda ĝardenisto, kiu deziras korespondi kun vi.

• Uno Albertson, Rosenholm, Hornslet, Danlando.

Geblinduloj ĉiulandaj, korespondu kun vidantoj per Braila skribo. Adresojn kolektas s-ro Th. Kutzli, Scheibenackerstr.6, St.Gallen-O, (Svislando) Represo dezirata.

HONORU LA MAJSTRON !

S-ro Delaire, el Francujo, ĵus eldonis belegan portreton de nia Majstro (formato 40/50 cm) sur tre bela papero. Estas nun la unuan fojon, kiam esperantisto havas la ideon grandkvante eldoni grandformatan portreton de Zamenhof, kiu devas loĝi en ĉiuj esperantistaj ejoj kaj ankaŭ en la hejmo de ĉiuj pioniroj.

Prezo afrankite: 120 fr.Fr. (aŭ 12 internaciaj respondkuponoj). Rabato de 20% po almenaŭ 10 ekzempleroj samtempe. Sendu la mendojn al la direktoro de Esperanto-Oficejo: S-ro Pierre DELAIRE, 2 rue de Vauquois, Orleans (Loiret) Francujo.



Baumann-Grütter Söhne

Langenthal

Ni rekomendas

el nia tol-teksejo:

teksaĵojn por dommastrumado
tablotukojn
tolojn por brodado
tolojn por vestaĵoj

plie el nia teksejo por dekoracio-ŝtofoj:

ŝtofojn por mebloj
kurtenojn
teksaĵojn por surprisi

Volonte ni liveras en ĉiujn landojn
kaj plezure servas interesulojn per
ĉiuj dezirataj informoj rilate niajn
ŝtofojn.

Nur pogranda vendado.

Ni korespondas esperante, germane, france kaj angle.

„LA PRATIKO“

la monata gazeto, kiu instruas kaj
amuzas eldonata de la

UNIVERSALA LIGO.

Ĉiu malnova Esperantisto abonas ĝin.
Ĉiu nova Esperantisto deziras ĝin.

Abonprezo por U. L.-membro: 24 ste-
loj-sv. Fr. 9.80 jare.

UNIVERSALA LIGO

Vi fariĝas membro de la U. L. dona-
cante almenaŭ unu simbolan brikon
en la valoro de sv. Fr. —.41; pluraj
tiaj brikoj estas aldoneblaj laŭvole.
Petu prospekton kaj deklaron de la
Centra Oficejo de la
UNIVERSALA LIGO

Riouwstraat 172. Den Haag (Nederlando)

aŭ de la Rezentantino por Svislando:

s-ino. Luise Riedle, Zürich 9 / Altstetten, Girhalden-
weg 1, Poŝtĉekonto: VIII 29 081.



Esperantistoj

Vi trovos grandan elekton de materialo, en bona kvalito, por la
higieno, toaleta kaj sanigado, speciale por la flegado de nov-
naskitoj kaj ties patrinoj, por la kuraco de malvarmumiĝo kaj
helpilojn por akcidentuloj en la vendejoj de la fakentrepreno

M. SCHAEERER S.A. BERN

Basel	Streitgasse 4	Tf. 4 82 81 (061)
Bern	Schwanengasse 10	Tf. 5 29 26 (031)
Genève	Rue du Rhône 15	Tf. 4 25 37 (022)
Lausanne	Place Pépinet 3	Tf. 2 86 72 (021)
Zürich	Pelikanstrasse 3	Tf. 23 52 24 (051)



PENSOJ DE ZAMENHOF

perloj el prelegoj kaj artikoloj de nia majstro
Elekto de homaranaj sencoj
Bela presigo, bona aspekto
Efika propagandilo por pruvi la internan
valoron de nia movado.

Disvendu, donacu ĝin al en — kaj eksterlandaj
gekonatuloj. Prezo fr. 1.—

Vendado pere de O. WALDER, ROMANSHORN

Presejo kaj eldonejo

Mettler kaj Salz AG

Tschannerstrasse 14 a, Bern
telefonó 5 15 73

rekomendas sin al la estimata samide-
anaro kaj societoj por la liverado de

PRESAĴOJ

ĉiuspecaj kaj ĉiuamplaksa

ĉe modesta kalkulado kaj bona kvalito

Linotyp-kompostmaŝinoj

Esperanto-literoj

Je via afabla atento petas

G. Salz, membro de Esperanto Societo Bern.




Hotel Metropol-Monopol - Bern

Zeughausgasse 28

La hotelo, kiu verdiĝis pro la 31-a Universala Kongreso en 1939 — kaj restis verda! eĉ pliverdiĝis! Trankvila restadejo por gesamideanoj el la tuta mondo. Pluraj Esperantaj gazetoj estas haveblaj en nia restoracio. Pro la afableco de la Esperanto-Grupo Bern, ties biblioteko, kiu enhavas pli ol 300 verkojn kaj troviĝas en la hotelo, staras je dispono de legemaj gastoj. Ni provos ĉiel eble agrabli vian restadon en Bern.

Familio A. Fischer



Ni liveras kompletajn maŝinarojn por la produktado de:

seka glacio

acetileno (dissolvita).

Ni fabrikas kaj liveras:

**aŭtogenajn veldilojn kaj tranĉbrul-
gilojn, valvojn por la ŝtalboteloj
premreduktilojn por ĉiuj gasoj kaj
premoj**

karbonacido-fajroestingilojn

elektrajn aparatojn por reguligi

aer-temperaturon kaj-sekecon

Ni korespondas germane, france, angle kaj esperante kaj volonte donos informojn al interesuloj en ĉiuj landoj. Ni tre ĝojos se pere de Esperantistoj ni trovos agentojn en aliaj landoj.

CARBA A.G., BERN Svislando